


INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO-REVUO

SEPTEMBRO 1979 ★ 6-A JARO, N-ro 2 (17)





**Johano
Pilinszky** •

Li ricevis ankoraŭ Lunu eblecon, la lastan. Ni, la klaso, kaj la instruisto sur la katedro,¹ ni ĉiuj konsciis, ke ankaŭ la „lasta ebleco” estos sen-espera. Sed... ĉu li ankaŭ konsciis pri tio?

Kiam li estis vok'ita por respondi, ĉies kapo turniĝis al li. Mi sidis Koblikve² malantaŭ li, kaj mi havis bonan al-rigardon sur lian pupitron.³ Lia libro kaj teko⁴ post-restis simile al savo-zono ĉe dron'into.⁵

Lia pala vizaĝo iĝis blanka. Antaŭ la nigra tabulo, li apenaŭ komprenis ion pri la demando, kaj li malkovris per sia unua vorto, ke li ne havas kapablon sin defendi. Ĉio de-pendis de tiuj kelkaj momentoj. Sed... el kiom da momentoj konsistis tiuj kelkaj momentoj? Li havis dek-du jarojn. Ankaŭ ni. Unu mallaŭta sub-diro, unu-nura helpa vorteto estus sav'inta lin. Ho, se neniam ni estus tra-viv'intaj tiujn kelkajn momentojn!

Oni tro frue iĝas matura por malbona ago. Ni lernis, kun li, dum du jaroj; kaj tiom da tempo ne estis sufiĉa, por veki en ni kompaton al li. Ni konis lian nomon kaj liajn kutimojn. Ni konis liajn vestojn,

Nemzetközi esperantó diáklap
Megjelenik évente háromszor
VI. évf. 2. szám
Felelős szerkesztő: Kurucz Géza
Kiadja
a Magyar Esperantó Szövetség
1081 Budapest, Kenyérmező u. 6.
Felelős kiadó: Vaskó Tibor



Készült a Nyírségi Nyomdában 4000 példányban
79. — 138 — Felelős vezető: Jáger Zoltán

Sur la titol'paĝo la desegno de 6-jara hungara knabino Maria Kurucz

KIUN ONI NE POVAS FORGESI

kaj ni rimarkis, kiam li ricevis novajn. Ni kutimiĝis al tio, ke li estas inter ni, ke li sidas sur sia loko, kaj ke li havas sian fenestro-niĉon⁶ en la koridoro,⁷ dum la paŭzoj.⁸ Kial ni for-lasis lin? Kial do?

Kiam li de-metis la kreton, li jam estis pere'inta⁹ ne-saveble, sed li ankoraŭ havis laboron: li devis viŝi kaj re-ŝovi la tabulon; li devis purigi siajn manojn, demeti la sponĝon¹¹ kiel viktimo¹² la turment'ilojn,¹³ kiel operaciito¹⁴ la sekciulojn.¹⁵

Intence, mi ne karakterizas¹⁶ lin. Intence, mi ne pri-skribas liajn trajtojn.¹⁷ Li sidis sur sia loko: kun pene tra-lernitaj jaroj sur si, sub la kontrolo de patro kaj patrino; kun sen-dormaj noktoj post si. Li rigardis al neniŭ. Lia infana vizaĝo lumis per sen-tempa blankeco same kiel tre fora kaj tre maljuna stelo sen-mova.

Lia malsukceso longe ne havis historion: nia kulpo-sento en-fermis la detalojn¹⁸ en glacion. Sed poste, ĉiam pli kaj pli klare re-venis en la memoron la maniero kiel li ek-staris, ĉiam pli kaj pli klare re-venis en la respondi, kiel li glutis¹⁹ sian salivon²⁰ turn'inte la vizaĝon al la klaso, la maniero kiel li metis la kreton al la tabulo, kaj kiel li ek-ir'igis ĝin, tir'ante malcertan blankan linion tra la nigra kampo de la tabulo al la sen-funda profundo de malluma abismo.²¹

Li ne ploris. Ankaŭ tio ŝajnis, poste, ne-el-ten'ebla. Kiam li estis send'ita al sia loko, eĉ dum momento, li ne ekskuzis²² sin, li ne

1. seĝo de instruisto kune kun la alt'ig'ita planko/ 2. flanke kaj antaue au malantaue/ 3. mebleto, sur kiun oni metas kajeron kaj libron por skribi kaj legi oportune/ 4. port'ebla ujo por lerniloj/ 5. droni: morti en lago au rivero pro manko de aero/ 6. niĉo: profund'aĵo en muro por en-teni ion/ 7. tra-ir'ejo, kiu kun-ligas cambrojn sur sama etaĝo/ 8. ne-longa interrompo inter du lernejoj/ 9. pere: morti; sen-viv'iĝi; neni'iĝi/ 11. ĉi tie: malpeza viŝilo por tabulo/ 12. persono, kiu mortis au mortos pro iu okazaĵo/ 13. turmenti: intence kaŭzi doloron al iu/ 14. operacii: re-sanigi iun per fortranĉo de malsana korpo-parto/ 15. kuracista tranĉilo/ 16. donas pri-skribon pri karaktero/ 17. karakteraj linioj sur vizaĝo/ 18. detalo: malgranda ne-grava parto de tuto/ 19. en-igi nutraĵon tra la gorĝo/ 20. fluaĵo produkt'ata en la buŝo/ 21. sen-fundaĵo/ 22. prezentis kialon por el-turni sin/ 23. el-paŝis kontraŭ maljust'aĵo/ 24. metronomo: ilo por mezuri egalajn tempo-partojn/ 25. konfuzi: meti en maltrankvilan staton/ 26. plumbo: peza griza metalo

protestis.²³ Li akceptis la sorto-baton honteme — sen diri vorton — kvankam li konsciis, ĉiu konsciis, ke li lernis. Ree okup'inte sian lokon, li movetis sin iom-ete, simile al metronomo,²⁴ konfuzita;²⁵ kaj poste — kvazaŭ ĉio estus jam nura memoraĵo —, li ŝajnis iĝi sen-korpa.

En la paŭzo — tio estis la sola diferenco —, li ne kun-prenis libron. El sia niĉo, li rigardis la preter-ir'antojn en la plumbo-griza²⁶ sub-pasejo; en-profund'ig'inte, li rigardis kun palpebroj²⁷ kun-tir'itaj, kvazaŭ li dezirus noti ne-vid'ebajn detalojn. Neniu el ni zorgis pri li; neniu pensis pri tio ke, hodiaŭ, li estas kun ni lasta-foje.

Pasis 25 jaroj de tiam, kiam ni — kiam mi — ne helpis al li. La vizaĝo de multaj, kiuj plue lernis kun mi, for-viŝiĝis el mia memoro. Mi forgesis granda-parte ankaŭ tion, kion mi lernis dum ok jaroj. Geografio, matematiko, fiziko: ĉu ili ekzistis iam? Kie estas la kajeroj, la libroj? Ili dormas ie — se io post-restis, en-tute — en la fundo de la memoro. Lumas nur lia vizaĝo, ne-forges'eble, en la malplena klas'ĉambro, inter la forges'itaj pupitroj, en la malaper'inta konstruaĵo. Nur la grincado²⁸ de lia kreto aŭdiĝas pli kaj pli orelo-ŝire.

Nu jes; hodiaŭ mi vidas kun klara konscio, kion mi ne vidis tiu-tempe: li ne ploris. Ĉar oni povas forgesi fizikon kaj matematikon; sed knabeton, kiu — dum ni iĝis plen'aĝ'uloj — ĉiam ankoraŭ staras antaŭ la tabulo; knabeton, kiun ni perfidis,²⁹ kaj kiu ne ploris: tiun oni ne povas forgesi.

El la hungara tradukis: G. Kurucz

(Pb)/ 27. palpebro: haŭto, kiu dum dormo kovras la okulon/ 28. grinci: el-igi orelo-ŝiran akran sonon/ 29. trompis; tro-uzis ies fidon.

Grésillon


KULTUR'DOMO DE LA FRANCAJ ESPERANTISTOJ

Karaj junaj amikoj!

Cu vi jam aŭdis paroli pri la kastelo¹ Grésillon (:greziljon)? Gi situas² en Francio, apud la urbeto Baugé (:boĝe), en regiono milda,³ plaĉa kaj riĉa pro

sia agrikulturo,⁴ pro siaj frukto-arbejoj, pro siaj historiaj riĉaĵoj.

Tie mi lernis Esperanton antaŭ 15 jaroj, kaj tie mi nun ofte instruas la Internacian Lin-



gvon. De kelkaj jaroj, dum la tiel nom'ata „Internacia Prin-tempa Semajno”, ni provas ar'igi esperantistajn infanojn kaj iliajn instruistojn. La lasta renkontiĝo de infanoj okazis inter la 11-a kaj la 18-a de aprilo 1979.

Kion oni faras dum tia semajno?

Kompreneble, oni lernas Esperanton. La kursoj okazas matene. Kaj... dum la liberaj horoj? Aŭskultu kelkajn el niaj gelernantoj!

„Ni organizis futbalo-turniron,⁵ ni ludis kaŝo-ludon kaj tablo-tenison...⁶ En la parko kaj en la arbaro, estas multe da lokoj por kuri kaj ludi. Ni ne enuis!”⁷ (Jean-Marc kaj François)

„Ni faris interesajn ekskursojn: ni vizitis la kastelon de Angers, kaj ni admiris tie la malnovajn sed tre belajn mur'tapiŝojn de „l'Apokalipso”, la

mult'kolorajn flor'bedojn⁸ en la ĝardenoj; ni fotis la urbon, la riveron kaj la kastelon. Poste, ni vizitis la muzeon, kie troviĝas, la belegaj tapiserioj⁹ de Jean Lurçat, „La kanto de l' Mondo”. Dum alia ekskurso, ni vizitis bienon¹⁰ kun multaj vitrodomoj por legomoj. La farmisto¹¹ klarigis la uzon de diversaj iloj.” (Patrick kaj Yannick)

„Dum vesperaj kun-venoj en la salono, ni kantis kaj ludis, rigardis filmojn kaj lum'bildojn. Ni bone amuziĝis.” (Sylvain kaj Philippe)

La dommastrin'eto, Marilene, al-donas: „La dormo-ĉambroj situas sur la unua kaj dua etaĝoj. Sur la pordoj estas numeroj. En la ĉambroj estas unu ĝis ses litoj, krome: ŝrankoj, tablo, seĝoj kaj tualetejo.¹² Ni gajigas la ĉambrojn per primoloj,¹³ kiujn ni kolektas en la parko. Vespere, antaŭ ol endormiĝi, ni babiladas.”

Nun vi havas pli precizan, kvankam ne kompletan,¹⁴ bildon pri Grésillon. Ĉu ni kon'at'igos, kun kelkaj el vi, okaze de la ven'onta Internacia Printempa Semajno? Ĉu vi eble povos veni printempe? Sciu, ke la kastelo akceptas esperantistojn dum la tuta somero, de la 1-a de julio ĝis la 1-a de septembro. Okazas pluraj stud'periodoj;¹⁵ kaj ĉiu el ili havas sian karakteron. Ni esperas ke, iam, vi havos la plezuron ĝui¹⁶ la belecon kaj la

etoson¹⁷ de tiu vizit'inda kaj jam fama esperantista rest'adejo. Antaŭ ol veni, petu informojn!
Adreso:

Esperantista Kulturdomo
Kastelo Grésillon
F—49150 BAUGÉ

Antaŭ la vizito, bone lernuan lingvon, por ke vi povu facile kaj flue uzi ĝin kun ali'landanoj; tio mult'obl'igos vian ĝojon. Bonan kuraĝon!

Frédéric LE MAGADURE, instr.

1. belega grand'sinjora domo en kamparo/ 2. kuŝas, troviĝas/ 3. agrabla por la sento/ 4. kulturado de la tero/ 5. sporta konkurso inter lud'antoj per pied'pilko/ 6. speco de sporto-branĉo/ 7. ni ne havis malplezuron pro manko de intereso/ 8. spaceto en ĝardeno por floroj/ 9. mur'tapiŝoj/ 10. kampara posedaĵo kun domo/ 11. bien'ulo/ 12. ĉambreto por sin kombi, brosi, vesti
- k. t. p./ 13. speco de printempa floro/ 14. kompleta: plena; sen-manka/ 15. periodo: tempo-daŭro/ 16. senti plezuron/ 17. spirita efiko fare de la naturo aŭ de homo-grupo.

PAROL'TURNOJ—DIR'MANIEROJ

Lia/ŝia koro batas en la gorĝo (Li/ŝi timas)

Flav'bekulo (sen-sperta junulo)

La mano lin jukas¹ (li dezirus bati iun)

Sidi sur pingloj (multe deziri for-iri)

Verŝi oleon en fajron (pli-igi danĝeron)

Bruligi la lip'harojn (malsukcesi en io)

Sanĝu la diskon!² (trans-iru al pli interesa temo!)

Kapti akvon per mano (vane peni; akiri nenion)

Nutri sir per espero (tro fidi; tro esperi)

Trans sep-oble sep landoj kaj maroj (en malproksima fabelo-lando)

Sal'itaj prezoj (tre altaj prezoj)

1. kaŭzas malfortan senton de pikado en la haŭto/ 2. disko: plata rindaĵo; ĉi tie: son'disko.



PIONIRO DE LA HOMA KULTURO

Albert Einstein

1879—1955

En tiu ĉi jaro, ni memoras la 100-an re-venon de la naskiĝa dato de el-stara fizikisto kaj humanisto:¹ Albert Einstein. Ne pli ol 30 jarojn aĝa, li jam estis mond'fama profesoro.² Per siaj laboroj pri fiziko, li malfermis novan epokon en la natur'sciencoj.

A. Einstein naskiĝis la 14-an de marto 1879 en Ulm (Germanio). Kiel malgranda knabo, li jam preferis amuzi sin per teknikaj ludoj. Dum liaj lernejoj, li speciale interesiĝis pri matematiko kaj fiziko. Instigon³ donis al li libro pri natursciencoj, kiun li, nur 13-jara, hazarde⁴ trovis kaj atente tra-legis sen-halte. Artikolo⁵ pri la lumo kaptis lian tutan atenton: „Se la rapideco de la lumo ne estas sen-fina, kiel opiniis Newton (:njutn), tio signifas, ke ĝi bezonas tempon, ĝis kiam ĝi al-flugas al ni de la brilaj steloj.”

La rigida⁶ viv'maniero en la monarĥa⁷ militista germana ŝtato ne plaĉis al li. Pro tio, li trans-loĝiĝis al Svislando. La juna nek'on'ata fizikisto ne tuj trovis konvenan laboron; tial, li laboris, dum sep jaroj, kiel oficisto en Bern. Tiu-tempe, li havis eblecon okupi sin pri gravaj problemoj, pri kiuj li interesiĝis jam kiel studento.⁸ la eco de la materio, la naturo de la lumo, la inter-ligo inter la spaco kaj la tempo. En la jaro 1905, en faka revuo, aperis tri artikoloj de Einstein, kiuj famigis lin kiel kre'inton de la teorio⁹ pri relativeco.¹⁰ Post kvar jaroj, li iĝis profesoro de fiziko en Zürich (:cirif) kaj poste en Praha kaj Berlin. Pro siaj meritoj, li ricevis la Nobel-premion pri fiziko en la jaro 1921.


Dieter Berndt

1. homo, kiu laboras en la spirito de amo al la homoj/ 2. instruisto en superaj lernejoj/ 3. puŝon al ago/ 4. hazarde: ne-antaŭ-vid'ite/ 5. verko en gazeto/ 6. malelasta/ 7. monarĥo: sen-de-penda ŝtat'estro/ 8. lernanto en ĉef-lernejo/ 9. studo pri sciencaj principoj/ 10. relativa: ia, kompare kun io alia.

Bona Espero estas insulo de kulturo en la centra ŝtato de Brazilo: Goiás. Bona Espero estis fond'ita de homoj, kiuj ne nur parolas pri la mizero¹ en la Tria Mondo, sed kiuj decidis iri al tiuj infanoj, por dividi kun ili panon kaj amon.

„Sed nia laboro ne limiĝas al la zorgo pri niaj infanoj (17), ni asistas² per ĉiu-speca helpo, kiel medikamentoj,³ vestoj, kovriloj, manĝaĵoj, konsiloj, helpo dum malsano... Nia laboro estas nur guto en maro da mizero, nia filozofio⁴ nur estas, ke multaj gutoj formas ja la maron”, skribis al mi s-ino Ursula Grattapaglia, unu el la fond'intoj de Bona Espero.

Ni deziras al ilia laboro multan ĝojon kaj sukceson!



Infanoj en la mango-ĉambro

INFANOJ EN BONA ESPERO

„Verdaj” infanoj kun kafo-bruna haŭto, ruĝa haŭto aŭ blanka — jen estas Bona Espero. Belaj mesticoj,⁵ ĉarmaj kabokloj,⁵ rid'antaj mulatinoj:⁵ ĉiu-specaj infanoj kune ludas kaj studas, manĝas kaj dormas, laboras kaj ridas, rajdas⁶ kaj kuras tie, tra la savano.⁷

„Bona Espero” fakte estas espero por dekoj kaj dekoj da kamparanoj, bovo-gardistoj, nigraj patrinoj de multaj gefiloj, kiuj naskiĝas sen-asiste, en foraj arbaroj.

1979 estas la Jaro de la Infano. Sed la infanoj ĉirkaŭ Bona Espero ne scias pri tio. Se vi dirus, al ili, ion pri la Jaro de la Infano, ili ne komprenus vin. Kio estas tiu strangaĵo? „Infanoj kutime naskiĝas, ĉiu-jare, en nia hejmo, sed plej-parte ili mortas. Feliĉe, ke la panjo ne ankaŭ mortas.”

Francilei (5-jara) ĵus rakontis al ni, ke ili estas kvar gefratoj, la aliaj sep mortis, tie, en la pajla⁸ kabano,⁹ ver'sajne pro malario.¹⁰ Kaj *José Neto* envias¹¹ sian lastan frateton, kiu havas patron. Li ja ne havas tiun feliĉon, ĉar lia patro for-kuris al alia minejo,¹² las'ante panjon kun sep gefiloj sola. Feliĉe, tri el ili nun povas vivi en Bona Espero, en vera domo kun veraj litoj.

Hudson (8-jara) estis vere bon'ŝanca, kiam granda venena¹⁴ serpento¹⁴ mordis¹⁵ lin. Oni portis lin rapide al la vilaĝo, kaj tiel li post-vivis la morton; restis nur grava strabismo¹⁶ en la okuloj, kaj pro tio li ĉiam vestas la dekstran piedon per la maldekstra ŝuo kaj inverse.¹⁷

Cu vi volus scii ion pri nia ĉiu taga vivo?

Ni vekigas je la 6-a horo matene. Ni lavas nin kaj ordigas niajn litojn. Poste, ni kuras al la kokin'ejo por ellasi la kokinojn kaj por kontroli, ĉu la lupoj¹⁸ ankaŭ ĉi-nokte provis rompi la metalan reton. Kaj eble, ni rigardas, kiel *Donizetti*, nia bovo-gardisto, melkas¹⁹ la bovinojn. Unu el ni portas sekan lignaĵon de eŭkalipto-arboj al la kuirejo.

Post la maten'manĝo (ni manĝas mem-bak'itan panon, mem-far'itan fromaĝon, trinkas ĉi tie rikolt'itan kafon kun lakto de niaj belaj bovinoj) ni helpas en la pur'ig'ado de la domo. Vere, nia domo estas tro granda kun siaj 16 ĉambroj, 4 banejoj kaj 4 terasoj. Tiel, ĉiu el ni devas purigi unu ĉambron. Sed ni jam estas spertaj kaj faras ĝin rapide.

„Onklino, ĉu hodiaŭ mi rajtas funkciigi la sonorilon por voki ĉiujn al la lernejo?” Feliĉe, por ni, la lernejo estas tute proksima; sed *Josemar*, *Josair*, *Valdivrosa* kaj la aliaj alvenas per ĉevalo; kaj kiam la suno brilas, ili alvenas pli-malpli ĝusta-tempe (je la 8-a kaj 30), sed kiam pluvas, ilia horloĝo — la suno! — ne funkcias, kaj facile okazas, ke ili alvenas kun unu horo da malfruo, sed tio ne gravas ĉe nia libera lernejo. Kalkuladon instruas al ni onklo *Giuseppe*, legi kaj skribi ni lernas kun onklino *Ursula*, kaj Esperanton ni studas kun onklino *Martha*. Ili rakontas al ni pri strangaj aferoj, kiujn ni neniam vidis, kiel ekzemple pri la grandega akvo, fera vagonaro, vojoj glataj²⁰ kiel la muroj de nia domo, kaj pri domoj, kiuj estas unuj sur la aliaj. Kaj ni aŭdis, ke tie, en la alia flanko de la mondo, loĝas infanoj, kiuj ne konas mangojn,²¹ advokadojn,²¹ venenajn serpentojn; kiuj neniam rajdis, kaj en kies ĝardenoj ne kreskas banano.²¹ Ne-imageble!

Je la 12-a horo, ni tag'manĝas, kaj post tio, ni ludas. Ni konas multajn ludojn. Iam ni rakontos al vi pri niaj ludoj. (Ni ne forgesos la promeson! La redaktisto.)

Je la 15-a horo, ni lunĉas.²² Poste ni laboras. Kelkaj laboras en la legom'ĝardenoj, aliaj — en la frukto-ĝardenoj. Ili rikoltas bananojn kaj oranĝojn,²¹ da kiuj ni konsumas, ĉiu-tage, almenaŭ unu sakon. Ĉiu-semajne, ni plantas unu frukt'arbon, ĉu mandarinino-arbon,²¹ ĉu citrono-arbon aŭ gujavo-arbon.²¹ Antaŭ la vesper'manĝo, ni banas nin kaj zorgas pri niaj vestoj.

Post iom da ludado, studado, babilado²³ kaj aŭskultado de diskoj, ni en-lit'iĝas je la 21-a horo. Ekstere, bruas multaj bestoj en la savano.

Ili promenadas en respekto-plena distanco, ĉar niaj grandaj lupo-hundoj ne permesas al ili al-proksimiĝi, kaj ni scias ke, nek la grandaj flav'nigraj katoj (jaguaroj), nek la simioj²⁴ kaj lupoj, nek ŝakaloj²⁵ venos al niaj fenestroj. Cetere, onklo *Vellozo* havas grandegan pafilon, kiun li uzis nur du-foje kontraŭ grandaj serpentoj.

Ha, ni tute forgesis rakonti al vi, ke preskaŭ ĉiutage, je la 14-a horo, ni naĝas en nia lago aŭ en la akvo-falo. Ĉu vi ne volas veni por naĝi kun ni?

La infanoj de Bona Espero

1. ega malriĉeco/ 2. helpas/ 3. kuraciloj/ 4. ĉi tie: mond'rigardo/ 5. speco de homoj/ 6. veturas, sid'ante sur la dorso de ŝarĝo-besto/ 7. herbo-riĉa ebenaĵo en varmega ter'zono/ 8. pajlo: trunketo de seka herbo/ 9. domaĉo/ 10. malsano, kauz'ata de kulo-pilko/ 11. deziras havi tion, kion alia posedas/ 12. mino: sub-tera karb'ejo, mineral'ejo k. t. p./ 13. veneno: mortiga aĵo/ 14. longa sennepa rampaĵo/ 15. ĉi tie: vundis danĝere/ 16. strabi: ne povi direkti ambau okulojn al la sama punkto/ 17. en mala, kontraua direkto/ 18. lupo: hundo-simila sovaĝ'besto/ 19. el-premas lakton el la lakto-organo de bestino/ 20. ebenaj sen ajnaj el'staraĵoj/ 21. frukto de tropika arbo/ 22. mallonga kaj malpeza manĝaĵo inter tag- kaj vesper'manĝo/ 23. babili: paroli pri ne-gravaj aferoj/ 24. simio: besto, simila al homo/ 25. rabo-besto, malpli granda ol lupo.

FAMILIA „IDILIO”¹⁾

Ne multaj esperantistoj scias, ke Kolomano Kalocsay (:kaloĉai) ankaŭ komponis.² Kiam li tra-laboris la muzikon de ĉarma kanteto por infanoj „Maja idilio”, dum semajnoj, li frapetis la klavojn³ de pianino kaj zum'kantis: „ŝaf'ideto, ŝafidet'...”

La cent-foje ripet'itaj melodioj⁴ el-ĉerpis la toleremon de la edzino. Kiam ŝi ne plu povis toleri la „bruaĉon”, ŝi energie deklaris:⁵

„Kolomano, elektu! Aŭ min, aŭ tiujn damn'indajn⁶ ŝafojn!”

Laŭ rakonto de Ada Csiszár



PIEDNOTOJ
sur
la
12-a
paĝo!

Allegretto.

6.

Ĝa-fi-de-to ŝafi-cet' Vana estis panja pet'
M - m - m - n - m - m - m - m -
Vi-e-nu-is la ŝafaron, vi sopiris trans la baron,



Filoj

Du virinoj ĉerpis akvon el pu-
to. Al-venis la tria al ili. Tre
maljuna av'eto ek-sidis sur ŝto-
no por ripozi.

Unu el la virinoj diris al la
alia:

„Mia fileto estas lerta kaj
forta, neniu venkas lin.”

„Mia filo kantas kvazaŭ naj-
tingalo.¹ Neniu havas tian
voĉon”, diris la alia.

La tria virino silentis.

„Kial vi diras nenion pri via
filo?” demandis la najbarinoj.

„Kion diri? Ĉe li, estas nenio
ekster-ordinara”, diris la virino.

La tri virinoj ĉerpis plenajn
sitelojn, da akvo, kaj ili ek-iris.
La aveto post-iris ilin. La vir-
inoj plu iris; dum momentoj, ili

ripozis. La mano kaj la dorso
doloris ilin.

Jen tri knaboj renkonte kuris
al ili.

Unu el ili faris trans-kap-
iĝojn. Tio plaĉis al la virinoj.

La dua knabo kantis kvazaŭ
najtingalo. La virinoj aŭskultis
ravite.²



Kaj la tria knabo al-kuris al
sia patrino, li prenis la pezajn
sitelojn, kaj portis ilin al la
domo.

La virinoj demandis la malju-
nan aveton:

„Nu, kiajn filojn ni havas?”

„Kie ili estas?” respondis la
aveto. „Mi vidas nur unu filon.”

Tradukis: Marie Bednářová
(Ĉeĥoslovakio)



enigmo

1. trankvila kaj sen-zorga vivo/ 2. kreis muzikajn verkojn/ 3. klavo: unu el la platetoj, kies ek-premo funkciigas iujn muzikilojn/ 4. melodio: sin-sekvo de agrablaj muzikaj sonoj/ 5. severe diris/ 6. damni: destini iun al la punoj de la Infero.

12

Vi vidas la foto-portreton de ok mond'famaj geaktoroj. Ĉu vi scias, kiel ili nomiĝas, kaj al kiu nacio ili apartenas? Se viaj solvoj estos sen-eraraj, vi ricevos premie jar'abonon al JUNA AMIKO por 1980. Sendu la solvojn sur poŝtkarto al la adreso: s-ro Géza Kurucz; Hítel u. 10. fszt. 16.; H-6000 KECSKEMÉT; Hungario antaŭ la 15-a de februaro 1980!

PIEDNOTOJ de „Filoj” (11-a paĝo!)

PIEDNOTOJ de „Familia idilio” (10-a paĝo)

1. najtingalo: speco de kant'birdo/ 2. ravi: igi iun admiri pri ne-ordinara okazaĵo.

13

KONTAKTO



INTERNACIA JUNULARA GAZETO

En la fino de 1963, aperis la prov'numero de *Kontakto*. Redaktis ĝin la nuna prezidanto¹ de la *Universala² Esperanto-Asocio (UEA)*, d-ro *H. Tonkin*, kiu estis tiu-tempe, unu el la ĉefaj aktiv'uloj³ en la *Tut'monda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)*. Tiu organizo decidis star'igi nova-specan gazeton. Post 16 jaroj, la gazeto plue aperas kaj havas similajn celojn kiel en la komenco. La celo estas: produkti internacian junularan gazeton *en Esperanto*, sed

ne nur *pri Esperanto*. Same kiel *Juna Amiko*, *Kontakto* prezentas artikolojn pri multaj diversaj temoj de la moderna mondo.

Okaze de la Jaro de la Infano, numero 60 de *Kontakto* prezentas, ekzemple, artikolojn pri infanoj (februaro 1979). Inter ili, oni trovas ankaŭ la artikolon de la redaktoro⁴ de *Juna Amiko*.

Numero 59 aperis en la komenco de decembro 1978, kaj temis pri homaj rajtoj. En la 20-paĝa numero aperis artikoloj

de junuloj en Britio, FRGermanio, Hispanio, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Svedio kaj Svislando. Tiu internacia numero estis preparita por la vintra seminario,⁵ kiu okazis en norda FRGermanio, inter la 27-a de decembro kaj la 3-a de januaro 1979. En tiu seminario, regule ĉeestas pli ol 100 junuloj el deko da landoj. Ĝia temo, ĉi-jare, estis: „Homaj rajtoj — teorio kaj praktiko.” Okazis pluraj prelegoj⁶ kaj diskut’rondoj. Dum la seminario, la partopren’antoj diskutis la artikolojn de *Kontakt*.

Numero 58 estis iom escepta.⁷ Du-ono el ĝi traktis⁸ temon pri la Esperanto-movado. Ĝi prezentis artikolojn kaj multajn fotojn pri la 34-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazis en *Veliko Tarnovo* (Bulgario) en julio 1978. En tiu kongreso kun-venis 450 junuloj el pli ol 25 landoj. Dum la lastaj jaroj, ĝi estis la plej granda kun-veno por junaj esperantistoj. La ĉi-jara IJK okazis en *Nederlando*.

En numero 57, oni povis legi pri malarm’ado; en numero 56, pri edukado por la moderna mondo; kaj en numero 55, pri televido kaj komunikado.

La nomo de la gazeto *Kontakt* rilatas al komunikado. La

intenco estas, ke la leg’antoj kontaktu⁹ unu kun la alia, pere de la gazeto; ĝi servu kiel forumo¹⁰ por iliaj ideoj pri la nuna mondo kaj pri ties problemoj. Pli kaj pli da novaj kontribuantoj¹¹ sukcesas aperigi siajn pensojn en la gazeto. Vova ideo helpas pri tio. La plano havas strangan nomon... „*Tentaklo*”! La tentaklo konsistas el aro da demandoj pri la ĉefa temo de la numero. La demandoj tuŝas la leg’antojn kaj invitas ilin respondi. En posta numero, ni presas ĉiujn re-agojn.

Kiel oni povas ricevi la gazeton *Kontakt*? Ĉiu individua¹² membro (vidu la 10-an numeron de JUNA AMIKO sur la 13-a paĝo) de UEA malpli ol 26-jara aŭtomate¹³ membriĝas en TEJO, kaj ricevas ĝin sen plia pago. Oni ankaŭ povas aboni al ĝi.

Jen vi havas informojn pri la en-havo de la lastaj numeroj. Eble, vi volas legi ĝin regule. Eble, vi volas renkonti aliajn junajn esperantistojn kaj partopreni internaciajn kunvenojn por junuloj. Se jes, serĉu kontakton kun via landa sekcio¹⁴ de TEJO. Eble, ni iam vidos vin en unu el niaj aranĝoj, aŭ en unu el la Internaciaj Junularaj Kongresoj!

Stefan MacGill
redaktoro de *Kontakt*

1. prezidi: estri la aferojn de organizaĵo/ 2. por ĉio kaj por ĉiu/ 3. aktiva: ag’ema/ 4. redaktisto/ 5. praktika kurso kun diskutoj en malgrandaj grupoj/ 6. prelego: parolado/ 7. sen tiu sola/ 8. trakti: diskuti pri la kondiĉoj de iu afero por veni al inter-konsento/ 9. kontakti: fari interligon/ 10. loko, kie oni diskutas pri gravaj aferoj/ 11. kontribui: alporti sian parton al komuna afero/ 12. individuo: ĉiu aparta membro el grupo/ 13. sen aparta abono/ 14. nacia organizaĵo.

LA RUBRIKON' GVIDAS

Josef Chvosta (:ĥvosta)

Engelsova 289,

290 01 PEDEBRADY

Ĉeĥoslovakio

Sendu ĉiun korespondataĵon
rekte al tiu adreso!



● La rubriko ne estas nur por anoj de la kluboj, sed por ĉiuj, kiuj legas la gazeton, kaj kiuj interesiĝas pri konkursoj, aŭ havas aliajn problemojn. Partoprenu do la konkursojn kaj skribu ofte! Ĉiu ricevos belan bild'karton en la respondo.

● La salut'karton kun pres'eraroj en la numero 14, sukcese solvis: *Teodora Keszi* (Hungario); *Ekaterina Sentova* (Bulgario); *Olja Paŝĉenko* (USSR); *Fedja Voloŝnik* (USSR); *Zvijezdana Zadravec* (Jugoslavio). Gratulon al ili!

● Al niaj kluboj al-iĝis kaj ricevas registran² numeron KJA/10 Esperanto-Rondeto en la palaco³ de pioniroj *T. Bércis*, pk. 150, RIGA 5, Latvio 226050, USSR. En la klubo estas tri studo-grupoj po 10 anoj. Ni bon'ven'iĝas ilin.

● X. Y. elpensis novan dat'adon por siaj leteroj, bildkartoj kaj okazaĵoj. La tagoj de la jaro estas numer'itaj de 1 ĝis 365 aŭ



366 en super-jaro. La jaroj estas numeritaj ek-de certa jaro, kiu estas kvazaŭ 0, kaj en kiu okazis io, kio estas not'ita per tri literoj. Do la ordinara dato: la 30-a de septembro 1979 aŭ mallonge 30-09-1979 — 1979-09-30 aspektas laŭ X. Y. jene:

- (a) UNO 34 — 273
- (b) AME 487 — 273
- (c) MAG 453 — 273
- (d) GOR 62 — 273
- (e) EIN 100 — 273
- (f) ROM 2631 — 273
- (g) GFR 190 — 273
- (h) RKR 116 — 273
- (i) OLY 2754 — 273

Provu trovi, ekde kiu jaro X. Y. kalkulas sian daton, kaj kiu grava okazaĵo (laŭ la literoj) estis en tiu jaro!

Bon'volu sendi la solvon de tiu konkurso aŭ ŝerco de X. Y. ĝis la apero de la nova numero, al la supra adreso!

Mi rekomendas al X. Y. du novajn manierojn: ESP 92 — 273 kaj SAT 58 — 273. Ĉiu certe scias, kiel ni venis al tiuj manieroj.

● X. Y. proponas ludon: preparu plurajn tri-opojn de kartoj, kaj signu ilin: I, II, III! Ĉiu

lud'anto ricevas unu triopon aŭ plurajn, kaj skribas frazojn laŭ la modelo: I. *Amiko*, II. *lavas*, III. *vazon*. Oni kolektas aparte la kartojn I, la kartojn II, la kartojn III, kaj oni miksas ilin. Poste oni komencas preni kartojn laŭvice, kaj iu legas la novajn frazojn, iam tre ridindajn. Preparu almenaŭ 10 triopojn!

I Evo	II manĝas	III suojn
----------	--------------	--------------

I Kato	II havas	III ŝton
-----------	-------------	-------------

I Mi	II legas	III kupon
---------	-------------	--------------

1. parto, angulo en gazeto/ 2. registri: enskribi, validigi/ 3. tre bela domo.

ĈU VI JAM
ALIGIS AL
KLUBO DE LEG-
ANTOJ?
NE MEDITU!
ALIGU TUJ!
EKHAVU KON-
TAKTON!

Bona maniero ekzerci vortojn

SEN-FINA VORTO-ĈENO

Unu el la plej malfacilaj — sed ankaŭ plej gravaj — taskoj estas: faciligi la parkerigon de vortoj. Ni volas helpi vin per prezento de tre simpla ekzercado pri vortoj, kiu donas eblecon aranĝi ankaŭ konkurson.

En la unua tempo, ni rekomendas skribi tiajn vortoĉenojn sur nigra tabulo, kaj traduki la vortojn al la nacia lingvo. Kiam la lernantoj tro longe haltas, la instruisto antaŭen-puŝu ilin per al'dono de konvena vorto. Post kelkaj monatoj, oni povas for-meti kajeron kaj tabulon.

Ĉiu vorto-radiko diferencu de la antaŭa per nur unu litero (la vorto ĉiam havu kon'atan sencon, kompreneble)! Ĉi-sube, ni prezentas, kiel ekzemplon, ĉenon de radikoj el tri literoj. Vi certe rimarkos, ke la ĉeno, ĉiu-paŝe, povus iri al iu alia direkto.

Ni esperas, ke tiu vorto-ludo helpas al vi en via laboro. Ni deziras al vi multajn sukcesojn!

RIMARKOJ: (1) Ni prononas ke, prefere, oni ne konsideru la vorto-finajn vokalojn: -o, -a, -i! (2) Oni ne re-venu al vorto jam dir'ita antaŭe!

sana — Bani — baRi — baTi — Kato — kaSo
kaNo — Rano — Pano — paVo — paKo — Lako
Sako — saTa — saVi — saMa — sUmo — suDo
suKo — Tuko — Buko — Muko — mOko — moLa
Tolo — tUlo — tuRo — tEro — tIri — Miri
Ŝiri — Diri — diKa — dEka — Veki — vOKi
voMi — voLi — Roli — rElo — Velo — Selo
Bela — beNi — bOna — Sono — Koni — koTo
koRo — Bori — bEro — Vera — vIro — viŜi
viDi — viVi — viCo — viNo — Kino — kiSo
Misa — mUso — muSo — muTa — muLo — Nulo
Kulo — Bulo — bAlo — baKi kaj tiel plu.

PAĜO DE KOMENCANTOJ

EVA FARAS AĈETOJN

Eva ricevas de la patrino 100 zlotojn¹ por fari aĉetojn.

Ŝi prenas la reto-sakon de la patrino.



Antaŭ la vendo-tablo de viandajoj staras longa vico da aĉet'antoj.

Ŝi aĉetas pecon da kolbaso, kvaronon de fromaĝo kaj 100 gramojn da salamo.



Ŝi pagas per mon-bileto de 100 zlotoj, kaj re'ricevas 10 zlotojn. Hejme, ŝi metas la varojn² sur la tablon, kaj

la kato ŝtelas la pecon de kolbaso.



De tiam, Eva ĉiam metas la manĝaĵojn en la fridujon.³

1. mon'unuo en Pollando/ 2. komercaĵo/ 3. ŝranketo, kies konstanta malvarmo konservas manĝaĵojn.

Ludmila Jevsejeva

En magazeno¹

En magazeno¹ INFANA MONDO, ploretas juna civitan'.*

Al vendo-tablo tiras avon li, per malgranda buba man':


„Aĉetu, avo, krokodilon, flageton kaj aŭtomobilon, rakedon, pilkon kaj tambu... u-u, u-u, u-u, u-u!”

„Aĉetu kamelon, trumpeteton, kuniklon, kolorajn kraĵonojn, tri-radan biciklon...”

„Ho ve!”, ek-voĉis la vendisto.

„Li volas aĉeti ĉion...”

Sed kiam venos Bepi kaj Jan, al ili mi vendos kion?”



1. vendejo/ * Serĉu la ne-konatajn vortojn en vortaro!

KASTORA LETERO

De J. H. Sullivan

Miaj karaj Kastoroj!

En la momento, kiam mi skribas ĉi tiujn vortojn, mi ankoraŭ atendas viajn rakontojn pri via liber'tempo, aŭ pri iu interesa renkontiĝo kun esperantistoj (por ebl'igi al mi al-juĝi premion, kiel mi diris en la lasta Kastora Letero). Espereble, viaj rakontoj al-venos ĝis la fino de julio. Mi mem vojaĝis al la sudo de Francio, kie mi vidis multajn interesajn lokojn, kaj renkontis multajn esperantistojn. Kien vi iris? Skribu al mi pri tio, eĉ se vi ne povis skribi mallongan rakonton por la konkurso!

DAT'REVENO

La nuna jaro estas aparte signifa por la Kastora Klubo ĉar, dum ĝi, la Klubo iĝos 15-jara. En la jaro 1964, la unua membro, la 10-jara Jarek Hlávka en Jihlava, Ĉeĥoslovakio, iĝis Kastoreto, kaj baldaŭ sekvis lin du knabinoj en Bulgario kaj Pollando. Kiam la unua Kastora Letero aperis en aprilo 1965, la Klubo konsistis el unu Bruna Kastoro (Jarek) kaj du-dek Kastoretoj en Bulgario, Pollando, Francio kaj Anglio. La unua Ora Kastoro estis la 13-jara Barbara Domanska en Nowy Targ, Pollando, kiu informis min, ke ŝi tiam korepondis ne nur kun tri ekster-landaj korespond'antoj laŭ la postulo per Ora Kastoro —, sed kun dek-kvin! Jarek, la unua membro de la Klubo, iĝis Ora Kastoro en septembro 1966.

ĈU VI ANKORAŬ NE ESTAS KASTORO?

Se ne, kial ne? Vi povas an'iĝi al la Klubo sen-page! Necesas nur lerni kaj parkere ripeti al via Esperanto-instruisto, la jenan tri-oblan promeson:

„Mi promesas diligente lerni Esperanton”

„Mi promesas ĉiam porti la verdan stelon”

„Mi promesas ĉiam konsideri alian homon kiel fraton, de kiu ajn raso,¹ koloro aŭ kredo li estas”.

Via instruisto informos min, ke vi tion faris, kaj ke vi komprenas la signifon de la promeso; kaj tiam mi sendos al vi atestilon² pri membreco en la provizora³ grado de Kastoreto, kun informo pri tio, kiel vi povos atingi pli altan gradon de Bruna Kastoro, kiu donas la rajton ricevi kaj porti la Kluban Insignon. Mia adreso estas: Ĉefa Kastoro, 3 Berwick Avenue, Urmston, MANCHESTER, M31 1PS, Anglio. Agu jam nun!

Nun, mi havas por vi rakonton pri mistero,⁴ kiu ekzistas jam de antaŭ pli ol 500 jaroj, kaj kiu eĉ hodiaŭ ne estas tute solv'ita! Temas pri la mistero de

LA NE-KON'ATA FAMA PENTRISTO

Kiel do — vi eble demandos — pentristo povas esti nekonata, sed tamen fama? Fakte, ekzistas, homoj, kiuj diras, ke li eĉ ne vivis! Do, mi rakontos al vi, kaj vi mem povos juĝi pri tio.

En la preĝejo de Sankta Bavon, en la belga urbo Gent, troviĝas granda bildaro, kiu konsistas el du-dek apartaj pentraĵoj. Ĝi estis fin'ita, en la jaro 1432, fare de la monde konata pentristo Jan van Eyck (:fan ajk); kaj la mistero troviĝas en sur-skribaĵo sur ĝia kadro, farita de Jan, kiu diras, ke komencis ĝin la pentristo Hubert van Eyck, „pli granda ol iu ajn alia”.

Fakte, stranga estas, ke tiu Hubert, kiu — laŭ Jan van Eyck — estis la plej granda pentristo en la mondo, estas nun tute nekonata, kaj ke neniu pentraĵo, sub-skrib'ita de li, ekzistas en la mondo! Do, la historiistoj de la pentro-arto devis agi kiel detektivoj⁵ por el-trovi, ĉu li ekzistis aŭ ne, kaj — se li ekzistis — ĉu li ja pentris iujn el la bildoj de la bildaro.

Ni scias, ke Jan van Eyck estis bone konata kaj lerta pentristo, kvankam neniu el liaj subskribitaj pentraĵoj estis faritaj antaŭ la jaro 1432. Oni eltrovis, ke iu Hubert van Eyck mortis en septembro 1426, kaj ni scias, ke Jan mem mortis en 1441. Tial, oni supozis, ke Hubert estis la pli aĝa frato de Jan. Sed... kial ni neniam aŭdis lian nomon, se li estis tiel fama? Se ne estus tiu sur-skribo sur la kadro, neniu eĉ sciis, ke Hubert iam ekzistis!

Tamen, zorga ekzamenado de la dudek bildoj montras, ke la stiloj⁶ estas malsamaj, kvazaŭ la bildoj estus faritaj de almenaŭ



Jan van Eyck: Geedza paro Arnolfini (1430)

du apartaj pentristoj; kaj en la urbo Gent, oni trovis kvar skribaĵojn pri iu pentristo, kies nomo — kvankam malsame skribita — povus eble esti Hubert.

La loĝ'antoj de Gent ĉiam volis kredi, ke Hubert, kiu ŝajne vivis kaj mortis tie, estis la star'ig'anto de la flandra⁷ skolo⁸ de pentristoj, kaj la kre'into de la granda bildaro. Tiuj de Bruĝo, ali'flanke, kredas, ke Jan sola faris ĝin. Kiu pravas? Neniu vere scias, sed en Gent staras monumento⁹ al la memoro de la du fratoj, kiuj kune sidas tie. Ĝi estis starig'ita en la jaro 1913, sed unu eminenta¹⁰ historiisto pri arto, Max Friedländer (fridlende), estis tiel certa ke Hubert neniam ekzistis, ke li rifuzis ĉeesti la senvaligon,¹¹ malgraŭ invito de la reĝo de la belgoj!

NIAJ PROMICIITOJ

La jenaj Kastoroj atingis pli altajn gradojn post la apero de la lasta Kastora Letero:

FARIĜIS ORAJ KASTOROJ:

658 *Barbara SZUMLANSKA* (Pollando)

663 *Dorota MURAWEL* (Pollando)

668 *Włodzimierz NAZAROWICZ* (Pollando)

FARIĜIS ARGENTA KASTORO:

836 *Daniela Milanova* (Bulgario)

FARIĜIS BRUNAJ KASTOROJ:

810 *Mie Itami*, 811 *Cinacu Kitaoka* (ambau en Japanio), 836 *Daniela Milanova* (Bulgario), 850 *Holger Linke* (DRGermanio), 878 *Donatella Barbana*, 879 *Luigi Barbana*, 880 *Stefano Cassani*, 882 *Massimo de Carlo*, 883 *Enrico Scarano*, 884 *Cristina Stolli*, 885 *Davide Treu*, 886 *Marco Treu*, 887 *Marco Bruzsecchese* (ĉiuj en Italio).

1. raso: ĉiuj homoj de unu pra-familio/ 2. atestilo: papero, kiu provas ies membrecon/ 3. nur dum certa tempo/ 4. afero ne-klarig'ebla/ 5. personoj, kiuj penas malkovri misteron/ 6. specialaj manieroj de pentrado, ekzemple/ 7. aparten'anta al unu parto de Belgio/ 8. grupo de artistoj/ 9. granda ŝtona memor'ig'ilo/ 10. al'tranga/ 11. vualo: teksaĵo uz'ata por kovri ion.

SOLVOJ de n-ro 16 (22-a paĝo) kaj de n-ro 15 (8-a paĝo)

Enigmo: sentimentala, triloj, rekte, surdulo, subita, apostrofo, tramo, reva aŭ retrovi, venena.

Anagramoj: anglo, loko, karbo, letero, remizo, dorno, diri, nomo, maneto, banko, korpo, virto, roko, mordi, metro, frago, regno, butero.

Aldonu komencan literon: barbo, vespero, karto, alaŭdo, evento, tremi, okulo, asocio, naŭ, elasta, aplaŭdi, kreto, haŭto, krano, esenco, haveno, ofendi, larmi.

ESPERANTISTOJ

Baldaŭ pasos la Jaro de la Infano, kaj ĉiu plen'kreskulo povos sin demandi: „Kiel mi kontribuis al ĝia sukceso?”

Ĉi-foje, mi ellevas nur malgrandan, sed tre seriozan temon.

Ek-de 6 jaroj aperadas (ĉiu-jare nur 3! numeroj) JUNA AMIKO, internacia lerneja Esperanto-revuo, el-donata en Hungario, redaktata de 28 konstantaj kunlaborantoj el 15 diversaj landoj. Ĝi celas, kiel la titolo montras, ĉefe lernejanajn, sed helpas ankaŭ plenaĝajn komencantojn. Varia en-havo, riĉe ilustrita per fotoj, plaĉaj grafikoj igis ĝin ŝatata periodaĵo en Esperantio.

Malgraŭ tio, kion oni povas konstati post tiom da jaroj da ekzisto? Unu afero estas senduba: la plej-multo da niaj lernantoj estante sem'tempe novulo en nia lingvo kaj movado, ne ricevas la bezonatan informon pri la periodaĵo, sekve la menciita aĝo-grupo ne povas ĝin aĉeti sen helpa interveno de plen'kreskuloj. Krome, ekzistas landoj (Kubo, Vjetnamio) — vi ĉiuj bone scias —, el kiuj oni absolute ne povas transpigi.

Ĉu vi ne trovas grava esperantista devo helpi la infanojn per livero de informoj; vi povus eĉ montri iun numeron de la revueto, kaj ĉu estus troa ofero aboni aŭ sendi jar'kolektojn por tiuj Landaj Asocioj, kies infanoj estas finance izolitaj, sed kies Esperanto-movadon ni deziras vigligi?

Se vi amas la infanojn, ne domaĝu el-spezi por ili bagatelan sumeton! Via kontribuo multe helpos. Bonvolu re-konsideri viajn eb-lecojn!

TRINK'EBLA PANO

La industria muzeo de Bern (Svislando) prezentis, en ekspozicio,¹ trinkeblan panon. La pano kaj ĝia recepto² venis el Sudano.

La trinkebla pano estas far'ita el speciala plata pano, kiun oni dis-erigas kaj bon'gustigas per diversaj spicoj. Poste, oni maceras³ ĝin en akvo, dum tri tagoj. Tiam, ĝi fakte iĝas trinkebla. Oni konsumas ĝin, ĉefe, dum la Ramadano (monato de fasto⁴ de Mahometanoj⁵). La riĉuloj kutime konsumas ĝin, dum la tuta jaro, kaj ili prezentas la panotrinkaĵon al siaj gastoj kiel simbolon de amikeco kaj paco. (Laŭ Basler Zeitung)

1. el-monro de vidind'ajoj por la publiko/ 2. pri-skribo pri la maniero kiel pretigi mang'ajojn/ 3. lasas ion longa-tempe en malvarma fluaĵo/ 4. fasti: de-teni sin de nutr'ajoj, dum certa tempo

JUNA AMIKO
Internacia Lerneja
Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H—1368 Budapest 5. Pf. 193.). Responda eldonisto: TIBOR VASKÓ. Redaktoro: GÉZA KURUCZ. Kunlaborantoj: D. Berndt (GDR), M. Boulton (Anglio), Y. Brion (Francio), J. Chvosta (Ĉeĥoslovakio), As. Grigorov (Bulgario), R. Grinšpan (Sovetunio), V. Heimlich (Israelo), L. Jevsejeva (Sovetunio), R. Okumura (Japanio), s-ino Ósz (Hungario), B. Ragnarsson (Islando), E. Raveloson (Madagaskaro), Z. Rehoříč (Jugoslavio), s-ino Saranath (Hinda Unio), T. Sekelj (Jugoslavio), J. H. Sullivan (Anglio), s-ino M. Turin (Francio), J. Zágoni (Rumanio), W. Zytyński (Pollando). Grafikistoj: J. Klement, P. Rak (Ĉeĥoslovakio), S. Plugor (Rumanio), s-ino E. Vali, Z. Vámos (Hungario). Lingva kontrolo: A. Lienhardt (Francio), A. Pechan (Hungario)

Kiadói Főig. engedélyszáma:
Minisztertanács Táj. Hiv.
III. (IFJ) 30/1976



pro religia kaŭzo/ 5.
Mahometo: tiu, kiu
fondis la religion: Is-
lamo.



● Lernantino 14-jara deziras korespondi kun gejunuloj de diversaj landoj. Si interesiĝas pri muziko kaj sporto, kolektas insignojn kaj pendaĵojn de ŝlosiloj. Sia adreso: Sabina Mujezinovič, Slatina 16 ulaz V—III—103, YU—75 000 TUZLA, Jugoslavio.

● Grupo de landa eksperimento pri Esperanto (10 mezlernejanaj 17-jaraj) volas estigi kontakton kun samaĝuloj el la tuta mondo. Skribu al la redaktoro, kiu gvidas ilian kurson: s-ro Géza Kurucz, Hítel u. 10. fszt. 16., H—6000 KECSKEMET, Hungario.

● 20-jara junulo serĉas hungaran leteramikon. Skribu al Ronald Schindler, W-Pieck-str. 44., DDR—209 TEMPLIN, Germana DR.

● 14-jara lernantino, kiu kolektas poŝtmarkojn kaj kolorajn bildkartojn, volas korespondi en Esperanto. Adreso: Audrone Andriulevičiūte, Prienu 19, 234365 STAKLIŠKES, Prienu raj., Litovio, USSR.

● Eva Schubert, 14-jara lernantino deziras korespondi kun samaĝuloj el la tuta mondo. Ŝi logas en Hammerbrückerstr. 7D, DDR—9656 TANNENBERGSTHAL, Germana DR.

● Lernanto 18-jara volas korespondi pri sporto, moderna muziko, interŝanĝi diskojn, bildkartojn, poŝtmarkojn kaj insignojn. Adreso: Emanuelis Mikitavičius, Miškinku 2—8, Piniava, 235356 PANEVEŽYS, Litovio, USSR.

● Pola esperantisto 19-jara volas korespondi pri sporto, muziko, turismo. Lia adreso: Pawel Jonkisz, ul. Kruczkowski-ego 11/51, PL—93—236 ŁÓDŹ.



„Pardonu al ĝi, ĝi ankoraŭ ne scias Esperanton.”

ABC
PRA KONVERSANTOJ

HUMANISMO¹

„Mi konvinkigis, ke estas pli bone doni ol ricevi”, diris viro al sia iama lerneja amiko.

„Vi estas vera humanisto!”

„Tute ne. Mi estas boksisto.”²

1. amo al ĉiuj homoj sen-distinge/ 2. sportisto, kiu luktaŭ per pugnoj.



humuro 